Raporto pri la Schulze Eduka Fonduso

11 Julio 2007

La Schulze Eduka Founduso celas provizi monhelpon al edukaj projektoj, kiuj antauxenigi la uzon de Esperanto, cxefe en Nord-Ameriko. La rento de la Fonduso haveblas por subvencioj, por unuopa projekto aux por pluraj projektoj. La receptulojn determinas "La Catherine L. kaj William H. Schulze Eduka Fondusa Komitato" (CWSEF-komitato), speciala kvin-homa komitato de ELNA. Subvencioj haveblas nur al membroj de ELNA, kaj oni ne rajtas uzi ilin por salaroj aux stipendioj.

En 1999 la Komitato aprobis peton de studenta grupo cxe MIT por provizi iom da mono por helpi acxeti la unuajn kvar lecionojn de la videobendo ESPERANTO: PASPORTO AL LA TUTA MONDO. En 2000 la Komitato aprobis $325 por acxeti tutan ekzempleron de ESPERANTO: PASPORTO AL LA TUTA MONDO por la komencanto-klaso de NASK. En 2006 ni (post 5 jaroj sen peto) ricevis peton. La komitato aprobis elspezon de $875 por subteni kursojn instruitajn cxe la Sud-Orienta Kongreseto en Atlanta je 1-2 Aprilo 2006. Dum la pasinta jaro ni ne ricevis peton.

Personoj, kiuj havas projekton por kiu ili volus ricevi monhelpon, devus sendi peton al la CWSEF-Komitato. La letero petanta monhelpon devas inkluzivi: (1) la planoj por la projekto, (2) la celo de la projekto, (3) la dauxro de la projekto, (4) budgxeto por la projekto, (5) la nomoj de la homo(j) kiuj faros la laboron, kaj (6) indiko de kiom da personoj la projekto helpos.

Petojn oni devus sendi (kutime gxis la 30-a de Aprilo) al ELNA aux al la Estro de la CWSEF-Komitato: D-ro Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Avenue, Jennings MO 63136-5004. Aliaj membroj de la komitato estas Ellen Eddy, Les Kerr, kaj Liz Raible. En Julio 2003 Betty Pagnani rezignis de cxi tiu komitato, En Auxgusto 2003 mi petis al Prezidanto Shlafer, ke li nomu alian personon por anstauxigi sxin, sed gxis nun nenio okazis. Nia komitato ankorau bezonas alian membron.

La nuntempa saldo de la fonduso "Schulze Education" estas proksimime $25,000, do sendu viajn petojn.

– – – –